

ĈEĤOSLOVAKA
ESPERANTO
REVUO

JARO XIII. NRO 7.
OKTOBRA N-RO
APERIS 28. XI. 1931

LA PROGRESO



OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—; fremdlando Kĉ 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pollando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ŝparkaso Praha: N-ro 34.271

TESTADO EN ESPERANTO - KURSOJ

Ĉiu memoras el siaj lernejoj, ke li ne tro fidis al la atestaj notoj, ĉar li konscie aŭ senkonscie sentis, ke la notoj estas sole taksado de liaj konoj kaj scioj. Depost proksimume 20 jaroj provas kelkaj pedagogoj trovi ilojn, per kiuj oni anstataŭ taksu ilin la rezultojn de lernado kaj instruado **mezurus**. Gvidanto en tiu celado estas amerika pedagogia psikologo Edward Lee Thorndike (naskiĝis 1874). Koncernaj mezuriloj kompilataj plej ofte laŭ rezultoj de statistika esploro estas nomataj testoj. Tiu klopodado estas nur en komenco de praktika uzado, sed tamen jam akiris kelkajn praktikajn rezultojn. Ne estas mirinde, ke oni ankaŭ provis havigi testojn por lernado de esp-o. La entreprenon iniciatis antaŭ kvin jaroj profesoro de pedagogio en la Ĝeneva universitato P. Boveŝ kreinte 6-membran komisionon por ellaboro de la testo-serioj. Prezidanto de la komisiono estis Thorndike mem, unu el la membroj estis verkinto de tiu ĉi artikolo. Kiel bazon de laboro oni prenis la testojn de Thorndike por la angla lingvo. En pedagogia instituto J. J. Rousseau tradukis kaj adaptis ilin por esp-o s-ino Ith-Danneil. Tia testaro konsistas el pluraj vicoj de proponoj asertaj, demandaj, ordonaj, al kiuj estas ebla unusola ĝusta respondo; tiamaniere oni povas simple kalkuli kaj sumigi la ĝustajn respondojn kaj montri la gradon aŭ kvanton de scio de la ekzamenato

en nombro. Oni komprenas, ke kompili la testaron ne estas facila laboro. Por trovi vortojn uzotajn en la unuaj frazoj s-ino Ith studis ĉiujn ofte uzatajn esperanto- lernolibrojn kaj kalkulis oftecon de vortoj uzataj en la unuaj kaj en la sekvantaj lecionoj kaj laŭ tiu rezultato kunmetis la frazojn de la testoj. Por esplori tiujn testojn kaj veni al rezultatoj pri sukceso de esperanto-instruado en diversaj medioj oni dissendis ilin por apliko en esperanto-kursoj kaj en lernejoj, kie estis esp-o instruata. Tio okazis dum la lastaj du jaroj kaj estis organizita de la nomita instituto (kiu intertempe fariĝis oficiala instituto ĉe la Ĝeneva universitato kun titolo „Institut des Sciences del' Education“) kaj de International Auxiliary Language Association (IALA) en New York. Oni sukcesis sendi testarojn al 168 instruantoj en 24 diversaj landoj. El tiuj 41 instruantoj (el 14 landoj) resendis kompletajn testojn, 70 instruantoj sendis testojn nekompletajn kaj 57 nenion resendis. Sed el la 41 resenditaj testaroj povis esti konsiderataj kiel taŭgaj sole 28. Ĉar oni devas pritrakti kiel neuzablajn tiajn testarojn, ĉe kiuj ekzemple instruanto helpis al la lernantoj, aŭ la lernantoj helpis sin reciproke aŭ helpis al si sekrete. Kvankam la nombro de uzebla materialo estis tiom malgranda, tamen oni venis al iaj rezultatoj. Oni ekzemple trovis jenan influon de aĝo ĉe lernantoj. Sukceso mezur-

rata per centra valoro estis ĉe

8 ĝis 14-jaruloj 76.38% (el 7 kursoj)
14 ĝis 18-jaruloj 84.05% (el 5 kursoj)
plenaĝuloj 87.15% (el 15 kursoj)

Influon de speco de la kurso montras jenaj rezultoj lau sama mezurmaniero:

kurso lerneja longa 70.83% (el 5 kurs.)
kurso lerneja rapida 88.02% (el 5 kurs.)
kurso eksterlerneja 87.15% (el 14 kurs.)

Pluraj rezultoj estas en Internacia pedagogia revuo jarkolekto 1931, paĝo 99, el kiu mi citas.

Por ricevi multe pli grandan nombron de uzeblaj testoj la Pedagogia universitata instituto kaj IALA komisiis sinjorinon Ith por viziti plurajn urbojn en Eŭropo kaj informi la bonvolajn fakulojn pri apliko de la testaroj en la kursoj publikaj kaj lernejoj. En Ĉeĥoslovakio ŝi vizitis fraŭlinon Šupichová kaj sinjoron Neužil. Ŝi ĉeestis testadon faratan de f-ino Šupichová en kurso gvidata de f-ino Dandová en Klubo de katolikaj esp-istoj en Praha la 26. de oktobro. Dr. Kamaryt veturis por interparolo kun s-ino Ith Wienon kaj ĉeestis kun ŝi la testadon de profesoro Simon en publika kurso en Volkshaus en XVI kvartalo la 3. de novembro. Nia Asocio konsentas organizi tiun testadon kaj petas la bonvolulojn turni sin por detalaj informoj aŭ al f-ino Šupichová aŭ al dro Kamaryt. Oni testos trifoje en ĉiu kurso, post ĉiu triono de ĝia daŭro. La testanto devas esti nek instruanto nek lernanto de la kurso. La testaron devas antaŭ la testado vidi nek la instruanto nek la kursanoj. La testaroj estas ciklostile multobligitaj kaj bele legeblaj. Ni rekomendas al niaj kunlaborantoj en urboj, kie ĵus daŭras kurso baldaŭ skribi al la du nomitaj niaj anoj. Kompreneble la testaroj povas esti aplikataj ankaŭ en kursoj komencotaj en januaro aŭ printempe.

Dr. Stan. Kamaryt.

Estante preskaŭ du monatojn malsana mi ne povis labori pri la Progreso. La bonaj amikoj bonvolu pardonni la prokraston en la aperado.

28. XI. 31.

Hromada.

EL RIMPORTRETOJ.

De K. Kalocsay.

XXXII.

Miloš Lukáš — la violeto,
En ombro kaŝe diligentas,
Ke li vers-arte eminentas,
Por multaj estas ja sekreto.

En lia brila interpreto
Poemoj ĉefaj elokventas,
Miloš Lukáš — la violeto,
En ombro, kaŝe diligentas.

Trasento, formo, rimo-meto
Pri vers-genio dokumentas.
Ho—kial al ni ne prezentas
Poemojn proprajn ĉi poeto?

Miloš Lukáš — la violeto.

Verkoj de Koloman Kalocsay:
Lingvo Stilo Formo tolbind. 32.—, broŝ. 20.—
Streĉita Kordo, poemoj tolbindita 38.—, broŝ. 27.—
Rimportretoj, rondel-poemoj tolbindita 30.—, broŝ. 20.—
Eterna Bukedo. Internacia poemantologio el 20 lingvoj, i a la ĉefa. 350 p. duonlede broŝ. 75.—
Plus 10% por sendelspezoj!

MALLONGA SKIZO DE LA NACIA EKONOMIO

Kaspar Hauser
Trad. R. H.

Nacia ekonomio estas, kiam la homoj miras, kial ili ne havas monon. Tio havas kelkajn kaŭzojn, la plej delikataj estas la sciencaj, sed tiuj povas esti nuligitaj per „kontraŭkriza ordo“.

Pri la malpli nova nacia ekonomio oni povas sole ekrideti, kaj tial ni povas ĝin preteriri silentante. Ĝi regis de la jaro 715 antaŭ Kristo ĝis la jaro 1 post Marx. De tiu tempo la problemo estas plene solvita: la homoj ja same ne havas monon, sed ili almenaŭ scias, pro kio.

La fundamento de la tuta nacia ekonomio estas tiel monata „mono“.

La mono estas nek paĝilo nek ŝanĝilo, ĝi ankaŭ ne estas fiktivo, sed antaŭ ĉio ĝi ne estas mono. Por mono oni povas aĉeti varojn, ĉar ĝi estas mono; kaj ĝi estas mono, ĉar por ĝi oni povas aĉeti varojn. Sed tiun ĉi teorion oni intertempe forlasis. De kie la mono venas, ne estas konate. Ĝi simple estas ĉi tie, eventuale ne estas — plej ofte ne estas. La papermonon cirkulantan garantias la ŝtato; tion oni praktikas tiel, ke la posedanto de la papermono povas veni al ŝtata banko kaj tie postuli oron por sia papero. Tion li povas.

La bonstato de lando bazas sur ĝia aktiva kaj pasiva komerca bilanco, sur ĝiaj enlandaj kaj eksterlandaj prunteprenoj, same kiel sur la diferenco inter la ĝiro de la kambia aĝio kaj la procentaĵo de la lombardaj kreditoj; dum pluva vetero estas male. Ĉiumatene en la ŝtataj bankoj oni fiksis per ĵetkuboj la t. n. diskonton; Germanoj sukcesis antaŭ nelonge ĵeti per tri kubo 20.

Rilate la mondekonomion, ĝi estas malsimpla.

Kiam la varoj pro vendo forlasis la fabrikinton, ili ne plu havas valoron, sed estas varaĉo, kontraŭe la fabrikinto havas monon nomatan „supervaloro“, kvankam tiu ĉi valoras ĉiam malpli. Se entreprenisto enuas, li kunvokas aliajn kaj kreas kun ili truston, tio estas ili interdeviĝas sin, ke neniel ili fabrikos pli da varoj ol ili kapablas fabriki, kaj ke la varojn ili ne vendados sub la memkosta prezo. Ke la laboristo por sia laboro ankaŭ rajtas ricevi salajron, estas teorio, kiun oni hodiaŭ jam ĝenerale forlasis.

Gravan rolon en la negoco ludas la eksporto. La eksporto estas, kiam aliaj devas aĉeti, kion ni aĉeti ne povas; ankaŭ estas nepatriote aĉetadi fremdajn varojn, pro kio la eksterlando devas konsumi la enlandajn, niajn, varojn, ĉar alie ni ne estus kapablaj konkurenci. Se la eksporto estas alie gvidata, oni ĝin nomas importo. Ĉar la malkara tritiko estas nesana kaj neniel egalas laŭguste la multekostan sekalon, ni havas doganon, kiu protektas la doganon kaj ankaŭ la terkulturadon. La terkulturado, de post kvarono de la jarcento estis praktikata sur rando de abismo, kie ĝi fartas ĝenerale bone.

Ĝi estas ŝuldoplena, ĉar la industrio nenion favoras al ĝi, kaj la industrio ne fartas bone, ĉar la terkulturado al ĝi ĉion forprenas. Tion oni nomas egaligo de la interesoj. De la ambaŭ institucioj estas postulataj altaj impostoj kaj efektive la konsumentoj ilin pagas.

Ĉiu ekonomio bazas sur sistemo de kredito, tio estas sur erara supozo, ke iu alia pagos anstataŭ mi la pruntitan monon. Se li ne faras tion, sekvas tiel nomata „saniga agado“, ĉe kiu ĉiuj faras bonan profiton, kun escepto de la ŝtato. Tiam bankroton oni ekkonas laŭ tio, ke la publiko estas admonata havi fidon. En plimulto da kazoj ĝi ankaŭ ne havas ion pli.

Se la entreprenistoj deponis ĉiun monon en la eksterlando, oni tion nomas seriozeco de la situacio. La bonordaj ŝtatoj scias facile trakti tian situacion: ili ne similas al malgrandaj rabistaj ŝtatoj, kie hordoj de brigantoj elsuĉas la suferantan loĝantaron.

Ankaŭ la akciaj societoj estas grava parto de la nacia ekonomio. La akciulo havas duspecan gravan rajton: li estas tiu, kiu donas la monon; li rajtas, dum la jarkunveno, iri en opozicion kaj dikti en la protokolon ion, el kio la estraro faras al si t. n. gajan tagon. La akciajn societojn oni ne povas ne havi en la ekonomia vivo: ĉar ili fabrikas la prefero-akciojn kaj la postenojn en la administraj konsilantaroj. La akcia societo estas responda al la administra konsilantaro pri la preciza pagado de fantiemoj. La elturniĝoj, en kiuj la akcia societo diras, kial ĝi ne povas paĝi la impostojn, estas kombinitaj je tiel nomata „bilanco“.

La ekonomio ne estus ekonomio, se ni ne havus la borson. La borso servas por anstataŭigi al multaj eksitiĝaj sinjoroj la klubon kaj la restoracion: la pli piaj vizitas krom tio ankoraŭ la sinagogon. Ĉiun tagmezon la borso ekrigardas la mondsituacion: tio direktiĝas laŭ la viddistanco de la bankdirektoroj, sed tiuj plejparte vidas sole ĝis sia nazopinto, kio cetere iam estas notinda distanco. Se la homoj en la borso krias eksterordinare, oni nomas tion: la borso estas firma. En

tia okazo alrapidas la sekvantan tagon la publiko kaj „engaĝas sin“, kiam la plej bonaj „glutoj“ estas jam for. Se la borso estas malforta, ĉiam la publiko enestas. Tion oni nomas: servo al la kliento. La borso plenumas gravan ekonomian funkcion: sen ĝi novaj spritaĵoj disvastiĝus esence malpli rapide.

En la ekonomio ekzistas ankoraŭ malgrandaj oficistoj kaj laboristoj, sed la novaj teorioj jam delonge forlasis ilin.

Resume oni povas diri: la nacia ekonomio estas la metafiziko de la pokerludanto.

Mi esperas, ke mi faris servon al vi per tiuj ĉi klarigoj, kaj aldonas sole, ke ili estas liveritaj, kiel ĉiuj varoj, kontraktoj, pagoj, kambiaj subskriboj kaj ĉiuj aliaj negocaj obligoj — do sen ia ajn obligo.

Malaperinta Ĉeĥoslovakio. La jarlibro de la angla ĵurnalo Daily Mail por la jaro 1931 alportas ankaŭ liston de la ĉefministroj de ĉiuj eŭropaj ŝtatoj. Sur la 251-a pago de ĉi tiu almanako ni legas la surprizan kaj interesan detalon: Jugoslavio: Udržal. Sed tio ne estas jam ĉio. La almanako ne sole translokis la ĉeĥoslovakian ĉefministron Udržal el Praha al Beograd, sed en la listo de la eŭropaj ŝtatoj tute mankas Ĉeĥoslovakio. La ĉeĥoslovaka gazeto, el kiu ni ĉerpas tiun ĉi informon, ne miras pri tio; ĝi nur trovas ridinda tiun ĉi manieron, en kiu la konata kontraŭulo de Ĉeĥoslovakio, lordo Rothermere, igis staki nian landon for el la mondo...

Ĉiu deka policisto en Wien scias la ĉeĥan lingvon. Laŭ la plej nova statistiko pri la lingvaj scioj de la Wien-a polico oni konstatis, ke el 5.800 policistoj scias paroli ĉeĥe 570, t. e. proksimume 10%; 118 policianoj parolas angle, 82 france, 70 itale, 47 pole, kaj 43 policianoj scias esperanton. Specialajn insignojn pri la lingva kono portas ĝis nun 179 policistoj. Ili deĵoras proksime al la stacidomoj, grandaj hoteloj. En kursoj oni instruas la lingvojn anglan, francan, italan kaj esperanton. Kursoj por la ĉeĥa lingvo estas rigardataj kiel senbezonaĵoj. Oni diras, ke scion de la ĉeĥa lingvo la junaj policistoj de Wien kunportas jam el siaj hejmoj.

Trovo de granda saŭro en Slovakio. Apud lago „Dopradské pleso“ estis trovitaj restaĵoj

de granda saŭro el la grupo de Dinosauroj (saŭregoj). Oni trovis suban makzelon enkreskintan en roko, sed dum la eliminado la dentoj fendigis kaj parto de ili restis en la ŝtono. Temas pri nova genro de saŭroj, nomita Lagunosauro. La kranio estis longa 50 cm, apartenis al la formacio triasa kaj troviĝas nun en la muzeo de slovakia urbo Turčianský Svätý Martin.

Filozofo Moses Mendelssohn estis profesie librotenisto. Iu el liaj favorantoj bedaŭris lin, ke li, klera kaj glora, vivas en situacio dependanta de lia ĉefo, tute sensignifa komercisto. Mendelssohn respondas: Ĝuste en tio estas videbla la dia providenco. Se mi estus lia ĉefo, mi absolute ne povus bezoni lin kiel libroteniston, kaj li troviĝus sen pano.

SERCAJ TASKOJ.

1. Tenu la manplaton tiel, ke la alia mano ne povu ĝin tuŝi.
2. Starigu en unu vicon 3 seĝojn, demetu la ŝuojn kaj transsaltu ilin.
3. Eliru el la ĉambro havante du piedojn kaj revenu kun ses piedoj.
4. Metu en ies dekstran manon iun objekton, kaj donu al li kiel taskon, ke li prenu la objekton per la maldekstra mano, ne movante la du manojn.
5. Sur la plankon metu pajleron aŭ vergeton tiel, ke neniu kapablu ĝin transsalti.

SOLVOJ

1. Vi plenumos facile, se via dekstra mano tenos la maldekstran kubuton.
2. Ni starigas en unu vicon la tri seĝojn, demetas la ŝuojn kaj poste ilin — la ŝuojn — transsaltas.
3. Ni eliros el la ĉambro kiel kutime kaj revenos kun seĝo en la mano.
4. Li sukcesos, se li metas la objekton sur la tablon aŭ la plankon, poste sin turnas iom kaj prenas la aĵon per la maldekstra mano.
5. Ni metas ĝin tre proksime apud la muro.

El la gazeto „Radosť“.

La aventuroj de Robinson Kruso.

Legolibro kun multaj ilustraĵoj.

139 p., 23×16 cm, bindita 30.— Kĉ afrankite. Kun klarigaj legekercoj. Tre praktika por komencantoj. Kompilata de H. J. Bulthuis, L. K.

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA VII. SOCHAŘSKÁ 333.

NUMERO 39. - NOVEMBRO 1931.

Ĉtenáři,

ĉti a uvažuj!

Jistě vyhovíš!

A Tvoji známí esperantisté?

Máme za to, že jednou z velmi zajímavých částí Progresu je i pro Tebe Věstník Svazový. Tam dočítáš se o činnosti skupiny osob, které se věnují vybudování pevného střediska a při tom zároveň plánovité propagaci esperanta u nás.

Ĉetls, že jsme zorganizovali pomocí esperantského filmu o Dánsku **propagaci**, které se zúčastnilo přes 10.000 osob.

Víš, že jsme zorganizovali přednáškovou turné p. Scherera, jež nám umožnilo výbornou **propagaci** před jistě — **dalšími 10.000 osobami**.

Uspořádali jsme **manifestaci v Pardubicích**, jež byla dalším propagačním podnikem ve dny, kdy město přeplněno bylo hosty z celé republiky.

Cílým klubům a pracovníkům vydali jsme dalších 10.000 **propagačních letáků**; Esperanto mezinárodní pojiťko národů, v nové zdokonalené úpravě a dodáváme je za výrobní cenu a mnohdy i zdarma.

Zorganizovali jsme a z Prahy úspěšně řídíme dodávání **zpráv o esperantu časopisům celé republiky**. Na sta dokladů svědčí o zdaru této služby. Oficiálně uznala tuto službu vláda liechtensteinská.

Připravili jsme další **propagační nástup** v místech, kde dosud esperanto málo proniklo. Viz naše rozhodnutí o obecních **čítárnách**.

Další manifestaci připravujeme na příští rok v **Olomouci** (5. sjezd). Jistě přinese vzrůst hnutí na Moravě.

Za svojí národní povinnost považujeme přispěti k vydání **Československé anthologie**, k níž jsme dali popud a její přípravě práce řídíme.

Esperanto na školách (memoranda, rozklady a petice), **propagace mezi**

mládeží, (Studentská sekce), **propagace československé věci** v cizině (začátek Průvodce o Praze) **propagace v radiu** (viz nové rozhod. ministerstva pošt), a celá řada menších, ale stejně obětavě vykonaných prací a podniků, o nichž ve Věst. podáváme pravidelné zprávy, to vše, jako pozornému čtenáři, je ti jistě dobře známo.

Všechny tyto podniky, jež se zvláště letošního roku silně rozvinuly, zajiště ke spokojenosti všech, kteří po tom volali, — vyžadují **oddané práce** Svazového výboru a jeho spolupracovníků, kteří ji **rádi** dávají.

Vyžadují však i **peněz**: za poštovní výlohy, za rozmnožovací stroj, za tisk (letáky, Věstník).

Proto voláme po **silném Svazu**, jehož práci by umožňoval a podporoval **velký** počet členů.

Ĉtenáři, který jsi sledoval práci konanou, pod štítem Svazu čl. esperantistů, **přístup k nám!**

Přihlas se ještě teď na konci roku za člena Svazu a zašli příspěvek za letošní rok.

Vidíš přece, že tvého příspěvku

Kč 16'—

bude použito na práci plodnou, na snahy za větším rozšířením myšlenky nám všem společné a drahé.

Obrácíme se zvláště na gážisty, na úředníky (státní, bankovní i soukromé) na profesory, na učitele, jakož i na všechny, kteří dosud nejméně jsou postižení všeobecnou tísní:

Dojděte v prosinci na poštov. úřad, opatřte si tam biankosloženku a vyplňte ji jménem: Svaz československých esperantistů, čís.: 9.602 a část.

Kč 16.—

Jednou za rok, až když jste svým povinností v ostatních organizacích učinili zadost, obrací se k Vám Váš esperantský Svaz. Nedejte, aby nadšení osob, které nyní pracují pro věc ve všech svých volných chvílích, pokleslo pro Váš nezájem. A kdyby to, co letos

Svaz koná, zdálo se Vám jeŝtĉe málo, máte vĝdy moĝnost nabídnouŝi se k práci další.

Jeŝtliĝe kaĝdý z Vás vyhoví výzvě a přihláŝi se dodateĝne na rok 1931

stoupne poĝet svazovĝho ĝlenŝtva
o 100%

To znamená, zdvojnásobení dosavadních pracovních moĝností. Můĝete nevyhovĝt?

Při placení poznameneĝte na sloĝenku, kterou z bezplatných premií Vám máme zaslati s legítimací:

S = Svaz národů o esperantu. 48 str.

C = Collinson: Esperanto a jeho kritikové. 24. str.

P = Paco per Lernejo. 23 str.

Poj = 20 letáků „Pojítko“.

Z = 10 pohlednic „Zamenhof“.

Dr. Stan. Kamaryt.

předseda Svazu ĝeskoslovenských esperantistů.

PROTOKOLO.

pri la 5. komitatata kunveno de ĈAE okazinta merkrede la 14. Oktobro 1931 en Praha, kafeĝo Louvre.

Ĉeestis S-oj Ĝinz, Slavík, Janda, Vofrubec, F-ino Tarantíková, Dro Pitlík, S-ino Herzigová, S-ro Suŝtr, F-ino Rabi. Senkulpíĝis sin S-ro Hromada (malsana).

La kunvenon ĝvidis vicprezidanto Dro Pitlík.

Daŭro de la 20.45 h. ĝis 22.45 h.

Dro Pitlík informas, ke per dekreto de 3. X. 1931 nro 134.262-I. 1. li estis nomita ekzamena komisario ĝe la Ekzamena Komisiono en Praha, anstataŭ S-ro direktoro Eiselt kiu rezignis pro la aĝo. Plie Dro Pitlík raportas pri sia parolado pri Kolonia Ekspozicio, kiun li havis en Hradec Králové la 7.-8. Oktobro en la kadro de la Propaganda semajno. Dum sia parolado li ankaŭ menciis esperanton.

La Eltrancaĝa Oficeĝo petas paĝi abonon por plia jarkvarono Kĝ 107.10. Decidite paĝi.

S-ro Slavík prezentas liston de siaj elspezoj (por ekspedo de cirkuleroj ktp) Kĝ 110.80. Decidite paĝi.

F-ino Supíĝhová, informas, ke kvankam ŝi sendas al Národní Politika siajn informojn reĝule, la redakcio presíĝas ilin, en la lasta tempo, sole en la eldono por ekster-Prahaj abo-

nantoj.

Mladá generace nár. dem., esp. odbor Horní Litvínov petas prunti ekspozician materialon. Konsentite, prizorgos S-ro Suŝtr.

Propagandaj afiŝoj: Ni traktas pri la ĝeĝa eldono en du formatoj; ofertoj estas atendata.

Gvidfolio Praha. La sendaĝo al la kongreso revenis el Krakovo kun rimarko, ke ĝin malfruigis la pola doganeĝo. La gvidfolioj estas dissendataj al la eksterlandaj partoj.

Propaganda semajno: Venis informoj de diversaj kluboj pri laŭplana propagando en la senco de nia cirkulero.

Paroladoj de S-ro. Scherer: Venas detaloj pri la programo en la respektivaj lokoj. En ĈSR. li estos de 26.-10. ĝis 25.-11.

Aprobata la financa kontrakto de S-ro Ĝinz kun S-ro Scherer.

S-ro Suŝtr demandas, kial Progreso ne aperis. S-ro Ĝinz informas, ke li jam resendis presprovajon al la preseĝo. Debato pri tio, ke almenaŭ la Bulteno kun aktualaj informoj aperadu akurate kaj reĝule. La redakcio estos petita pri reĝula aperado de La Progreso, aŭ almenaŭ de la Bulteno.

Ekspozicio de Pardubice. La Eksp. Komitato petis Asocion, pere de EK Pardubice, donaci parton de la ekspoziciaĝoj al muzeo instalota en Pardubice.

UEA sendis por Esperanta Fako de la Nacia Muzeo en Praha 1 ekz. de la Bibliografio.

Du punktoj estis deklaritaj kiel konfidencaj, ĝar temas pri preparoj.

Protokolis Tarantíková. Vidis Dro Pitlík. Traĝukis Hromada.

MOVADO EN ĈEHOSLOVAKIO

Gvidfolio pri Praha.

Ĉeĝoslovaka Asocio Esperantista eldonis en julio 1931 belan faldprospekton pri Praha, 12 paĝan (10.5 x 25 cm) kun 9 ilustraĝoj. La teksto lerte verkita de S-ro H. K. Bouška estas tre praktika helpilo por vizitantoj de Praha. La gvidfolio estas senpage sendata al eksterlandaj samideanoj; ĝranda kvanto estis jam disvastigita.

Vysoké Tatry.

Ĉeĝoslovaka Ministerio de Fervojoj eldonis (en sia kolekto de propagandaj monograĝioj) bele ekipitan gvidlibreton 24 paĝan (10 x 25 cm) pri la slovakia montaro Vysoké Tatry (Altaj Tatroj)

La libreto enhavas 38 ilustraĵojn, karton pri la teritorio de Tatry, karton de fervojaj linioj kun rektaj trajnoj kaj reproduktaĵojn de du pentraĵoj de Otakar Stáfl. La tekston tradukis S-ro J. Filíp.

Nova ŝtata ekzamenanto de esperanto.

Ĉe nove kreita germana sekcio ĉe Ekzamena komisiono por popolaj kaj burĝaj lernejoj en Bratislava estis nomita en oktobro 1931 ekzamenanto por esperanto **Dr. Stan. Kamaryt**, profesoro en Bratislava. Germanlingvaj samideanoj, precipe instruistoj kaj profesoroj, intencantaj esti oficiale ekzamenataj bonvolu sendi siajn aliĝojn laŭ la adreso: Prüfungskommission für Volks- und Bürgerschulen, Deutsche Sektion, Bratislava, Deutsches Realgymnasium, Palisády str.

Nova ekzamena komisario en Praha.

La ĝisnuna komisario S-ro direktoro Eiselt rezignis. Kiel nova esperanto — komisario ĉe la Ekzamena komisiono por ĉeflingvaj popolaj kaj burĝaj lernejoj estis nomita D-ro Aug. Pítlík. La dekreto de la ministro portas la daton 3. Oktobro 1931 kaj numeron 134.262-1. D-ro Pítlík informas nin, ke li eldonos koncizan materialon por la ekzameno el la ĉeĥa lingvo, pedagogio, kaj lernejoj leĝoj por tiuj kandidatoj, kiuj ne estas profesoroj aŭ instruistoj kaj devas, krom esperanto, fari ekzamenon el tiu ĉi materio.

Ŝtataj ekzamenoj.

Ĉe ĉeĥoslovaka komisiono en Bratislava faris 18. XI. 1931 sukcesan ekzamenon por burĝaj lernejoj f-ino **Margit Feldmanová**, instruistino en Kežmarok, kaj s-ro **J. Felt** el Zlaté Moravce.

Oficiala instruado.

En ŝtata burĝa lernejo en Kežmarok estas en lernejjaro 1931—32 instruata esp-o kiel nedeviga fako al 15 lernantoj. Instruas instruistino de tiu lernejo f-ino **M. Feldmanová** du horojn semajne.

Brno. La Esp. Klubon vizitis antaŭ nelonge poŝtestro kaj alportis leteron. Ĝia adreso enhavis nomon de S-ino **Stratilová**, nomon de strato kaj domnumeron. La nomo de la urbo — mankis. La letero vagis dum 4 jaroj tra Ĉeĥoslovakio, ĝis nia klubo ĝin sendis al la ĝusta adreso, al S-ino **Stratilová**, edzino de UEA — delegito en Břeclav.

Al la esperantistoj en Brno kaj ĉirkaŭaĵoj.

Esp. Klubo aranĝas la 15. Decembro kunvenon kun Kristffesta programo. Al partoprenantoj estos servataj desertoj.

Bratislava. Esperanto — Klubo kunvenas nun merkrede kaj sabate en sia klubejo, strato Vydrica, 16. — La klubo havas sian ĝeneralan kunvenon sabate la 28. XI.

Bratislava. Kurson por siaj anoj aranĝis social-demokrata sindikato Typografia. La kurso komencis en fino de oktobro en la societa ejo (Dunajská 55), instruas s-ro **Kolman**.

Plzeň. Laborista societo en „Peklo“ solenis de la 24-a de Oktobro ĝis la 1-a de Novembro la dudekan jaron de sia ekzisto. Sabate la 24. X. okazis en la kolona halo de la Laborista domo „Peklo“ vespereto kun teatraĵeto, krom alia programo. Dimanĉe la 25. XI. estis solena ĝenerala kunveno kaj malfermo de la ekspozicio, kiu daŭris ĝis la 1. XI.

Moravská Ostrava. La klubo en **Vítkovice** havas depost libertempo kunvenojn ĉiudimanĉe, 10—12 horo, bone vizitatajn en ejo de Sindikata domo (Odborový dům). La klubo sub gvido de sia prezidanto s-ro **VI. Slaný** komencis intensivan varbadon de membroj kaj vastan poresperantan propaĝadon, el kiu ĝi esperas fariĝi la plej grava grupo en sia regiono.

Moravská Ostrava. Kurso publika komencis en oktobro. S-ro **Křefínský** instruas 54 komecantojn, 7 progresantojn.

Mor. Ostrava — Vítkovice. Klubo aranĝis 8. XI. en gastejo de S-ro **Marek** en **Zábřeh n. O.** dancan amuzadon (*Taneční vínek*), al kiu ĝi invitis per grandaj verdaj ĉeflingvaj afiŝoj. Enirpago estis 3.60 Kč.

Mladá Boleslav. S-ro **Pytloun** kun helpo de samideanoj **Malina**; **Moucha**, **Podroužek** kaj **Reichelt** fondis tie Esperanto — Klubon. En tri lokaj gazetoj ili aperigis artikolojn el kaj pri esperanto. De la 6. Oktobro S-ro **Pytloun** gvidas ĉi tie kurson, kiun partoprenas 26 p. La paroladon de S-ro **Scherer** partoprenis 70 p.

Mnichovo Hradiště. S-ro **Pytloun** helpata de samideanoj **Blažek**, **Grindl**, **Košák** kaj **Malý** propaĝadis en tiu ĉi loko. La kurso estis anoncata per gazetoj kaj afiŝoj, vizitas ĝin 24 p., instruas S-ro **Pytloun**, depost la 14. XI. S-ro **Scherer** parolis al 400 infanoj kaj instruistoj de burĝaj lernejoj en (espo, trad.) S-ro **Pytloun** kaj vespere por 140 plenaĝuloj. (en espo, trad. S-ro **Sustr** el Praha).

Bakov nad Jizerou. La kurson komencitan la 16. XI. kaj gvidatan de S-ro **Pytloun** partoprenas 5 p. En la loka kinejo estas projekciata diapozitivo propaĝanda.

Prostějov. Meze de novembro komencis kurso por 18 komecantoj en ejo de knabina burĝa

lernejo; gvidas ĝin S-ro Heikenwälder.

Třebíč. Kurson en la ejo de lernejo gvidas de la 3. XI. S-ro Kilián por 26. p.

AL ĈIUJ!

Liechtenstein. La artikolon pri la interesa novaĵo el Liechtenstein en nia rubriko „Z esperantského světa“ bonvolu nepre publikigi en ĉiuj gazetoj de via loko. Sendu tri ekzemplerojn (ne elfranĉaĵojn) de la koncerna numero al s-ro O. Ginz, Praha II., Stárkova 4 kaj vi ricevos rekompence rekte el Liechtenstein poŝtkarton, pri kiu parolas la artikolo.

Ĉeĥoslovakaj gazetoj pri esperanto.

Pri la vizito de la IKUE prezidanto **Foňt Ĝiralt** en Ĉeĥoslovakio ni trovis artikolojn multajn; en **Brněnský Lid** Brno 24. IX., **Budoucnost** Brno 22. IX., **Čech** 22. IX., **Den** Brno 26. IX., **Lidové listy** 13. XI., 23. IX., 27. IX.; **Lidové noviny** Brno 22. IX., **Moravské noviny** Brno 21. IX., **Národní listy** 23. XI., 25. IX., **Národní Politika** 25. IX., **Slovák** Bratislava 27. IX., **Stráž Třebíč** 24. IX. kaj **Telegraf** 16. IX.

Internacia lingvo, ampleksa artikolo eltirita el verko **Zločinci z povolání (Profesij krimuloj)** de s-ro J. Vávrovský, aperis en **Veřejná bezpečnost** 22. IX.

El vivo de **orienta virino**, traduko el **Sennaciulo de V. Lor** en **Mladý socialista** nro 9-1931.

Pri esperanto, unupaĝa artikolo de **Ant. Jančík** temanta ĉefe pri signifo de internacia lingvo por komercistoj, estas en **Obchodní rozhledy** nro 10-1931.

Rudé Právo 11. X.: **Proletariaj esperantistoj en IPE!** Alvoko al subteno de laborista organizo esperantista.

Rozkvět nro 42-1931 havas du bildojn el esperantista vivo. Unu montras **ĈAE** — prezidanton **dron Kamaryt** inter grupo de **krakovaj kongresanoj**, la alia nian gaston la hispanan pastron **prof. Ĝiralt** kun esperantistoj de Praha.

Stráž kaj **Horácko**, ambaŭ el Třebíč, estas du gazetoj, kiujn ni ŝatas preni en la manojn. Ili regule raportas pri la progresado de nia lingvo.

Zájmy čl. poŝtovních a telegrafních zřizenců estas faka revuo simile atentanta nian movadon. 1. X. artikolo **Nova Zelando**, 1. XI. artikolo **Aŭstralio**, ambaŭ tradukitaj de **F. Votrubec**.

Středostavovské listy České Budějovice 16. X. informas la loĝantaron de tiu loko, ke en espo estis eldonita jam 1,000.000 da verkoj kaj ke nia organizo havas 50.000.000 (kvindek milionojn) da membroj. Iom tro forta tabako!

Z ESPERANTSKÉHO SVĚTA

Lichtensteinsko zve k návštěvě své země. V této zemi vydali novou serii oficiálních korespondenčních lístků se zajímavými obrazy z malebného knížectví, které se stává stále častěji cílem turistů všech zemí. K obrázkům jest přidán německý a esperantský text. Lístky jsou tištěny ve dvou barvách a jsou tiskařskou i filatelistickou zvláštností. Nákrasy a fotografie jsou mistrovským dílem známého vídeňského umělce **Kosela**, tvůrce mnoha poštovních známek. Pozoruhodno jest též použití esperanta, s nímž nabyła vláda Lichtensteinska již roku 1930 velmi dobrých výsledků při turistické propagandě. Návštěva Lichtensteinského knížectví jest velmi snadná ze Švýcar, z Německa, z Rakouska nebo z Itálie, avšak i turisté z jiných zemí se tam lehko dostanou, neboť země leží na mezinárodní trati Paříž-Vídeň.

Zastánci esperanta ve španělské sněmovně. Ústavodárné shromáždění ve Španělsku má mezi svými členy tři činné esperantisty: novináře, architekta a profesora. Jeden z nich, **Francesco Azorin**, píše v mezinárodním týdeníku **Heroldo de Esperanto**: Naše parlamentní úloha jest velmi vážná a odpovědná. Monarchie brzdila hospodářský i kulturní pokrok našeho národa po několik století. Naši snahou jest urychlit vývoj a postavit se po bok nejpokročilejších národů. Pro své vlastní problémy nezapomeneme však na otázku mezinárodního jazyka, který se stává vždy důležitějším pro sblížení národů a pro usnadnění moderních styků. Vskutku, pouze uznáním a zavedením mezinárodního esperanta se vyhneme nespravedlivému rozlišování jazyků na jazyky privilegované a jazyky poddané. Jen tak vybudujeme neutrální forum, kde sta národů bude pronášeti svá přání rovným právem. Mezi členy sněmovny jsou tři aktivní esperantisté, avšak mnoho příznivců. Doufáme, že se nám naskytne brzy příležitost podepřítí vydatně esperantské hnutí ve Španělsku.

Díla japonských učenců v esperantu. Organ japonského **Eugenického ústavu** přináší v každém sešitu esperantské resumé obsahu a rovněž články sepsané v mezinárodním jazyku. V jednom z posledních svčích čísel uveřejnil tento list rozsáhlý seznam thesís, které byly universitními profesory japonskými sepsány v esperantu.

EL ESPERANTO-MONDO.

24. Kongreso de Esperanto en Paris.

Venis informoj, ke la preparaj laboroj jam komenciĝis. La kongreso okazos de la 30 Julio ĝis la 6. Aŭgusto 1932. La LKK konsistas el S-ro Georges Warnier, prez.; S-ro ĝeneralo Bastien, vicprez.; S-ro L. N. Newell, ĝen. sek.; S-ro Lucien Tuleu, kasisto; S-ro Jean Couteaux, René Dubois, Maurice Duperray kaj Célestin Rousseau.

„Paris-Esperanto“ skribas: Gravaĵo estis alprenitaj . . . sed ni devas esti diskretaj. Tamen, ĉu estos peko diri, ke la Kongreso organizos grandan teatran prezentadon kun talenta profesia aktoraro; ke tiu prezentado okazos en unu el la plej grandaj teatroj de Parizo; ke ni havos grandan internacian balon „kostumitan“; ke la solena malferma kunsido okazos en unu el la plej grandiozaj salonegoj de la mondo; ke oni eldonos kaj donacos belegan gvidlibron pri Parizo; ke oni zorgos, ke la kongreso estu neforgesebla memorajo por la ĉeestantoj; ke „Kongresa Gazeto“, redaktata de nia plej humora verkisto Raymond Schwartz . . . sed ni vidas, ke la ĝenerala sekretario direktas al ni straban rigardon kaj se ni plue parolos, li certe malhelpos, proksiman fojon, ke ni aŭskultu ĉe la pordo“.

La poŝta adreso estas: XXIV.-a Universala Kongreso de Esperanto, Maison de France, 101, avenue des Champs-Élysées, Paris. La karto estas 125 fr. frankoj (do kiel kutime ĉ. 165 Kĉ.)

La kongresa karto numero unu estas vendota aŭkcio. Jam nun estas pagopropono: 2.000 fr. Kiu donos pli?

Ĉar ni esperas, ke el Ĉeĥoslovakio veturos tiun ĉi fojon granda karavano, ni ĉiokaze ricevos fervojan rabaton sur la tuta linio Praha-Paris La ordinara prezo de unu veturo, III. kl. de rapidvagonaro estas 436 Kĉ. II. kl. 670 Kĉ.

Ĉiujn pluajn informojn ni publikigos sinsekve laŭ tio, kiel la Parizanoj ilin sendos al ni.

*

Julio Baghy, faras nun kursojn en Tallinn, laŭ rekomendo de Ĉe-instituto, anstataŭ la norvega s-ano J. Schjerve. La provlecionon ĉeestis 300 p., la kurson partoprenas 80 p.

La 14 taga kurso, kiun S-ro Ĉe havis en Tartu (Estonio) estis aranĝita de la Instruista Asocio de Estonio per ŝtata subteno. Partoprenis ĝin 157 p., inter ili 112 ĝeinstruistoj, 19 studentoj, 26 p. el diversaj profesioj. La provlecionon la 26. VI. en la granda aŭditorio de la universitato ĉeestis ĉ. 300 p., inter ili la polica prefekto, prorektorino de la universitato, pluraj profesoroj kaj diversaj

eminentuloj de la urbo.

La ĝenerala Estraro ne permesis, ke la kongreson en Krakovo salutu prof. O. Kuzjma en la nomo de la ukrainaj esperantistoj de Polujo. Pri tia decido ni ne povas konsenti. Poloj ekzemple, same kiel Ĉeĥoj rajtis saluti la kongresojn jam antaŭ la milito, kvankam ili ne havis memstaran ŝtaton. Neniu saĝa kontraŭstaras, ke Germanoj en ĈSR nun salutas la kongresojn. Tiom pli rajtis aŭdiĝi la reprezentanto de la ukraina lingvo.

Esperantista Akademio elektis kiel sian prezidanton — post morto de prof. Cart — la ĝisnunan vicprezidanton S-ion J.M. Warden en Edinburgo.

Naciaj kongresoj 1932. La Ĉeĥoslovaka (5-a) okazas en Olomouc. — La belga (21a) estas aranĝata en Antverpeno okaze de la 25jara jubileo de la ticia grupo „La Verda Stelo“. — La Brita (25a) en Southport. Ĉiuj tri dum Pentekosto (15. Majo 1932).

La Urba Konsilantaro de Lyon (prez. Herriot) akceptis la 21. 9. la sekvantan rezolucion: „Konsiderante, ke dum ke la popoloj povas esprimi siajn ideojn sole en la naciaj lingvoj, la laboro pri pacigado kaj alproksimiĝo interpopola restos vana, la Urba Konsilantaro de Lyon postulas, ke en ĉiuj lernejoj publikaj kaj privataj de la tuta mondo oni devige instruu la internacian helplingvon Esperanto“.

Esperanta filmo Pri Danujo, kiu komence de 1931 estis projekciata en multaj lokoj de ĈSR, estos nun prezentata en Belgio.

En Haag novaj aŭtomataj aparatoj estis instalitaj en la publikaj telefonstacioj. La instrukcioj pri ilia uzado estas en lingvoj nederlanda, franca, germana, angla kaj esperanta

Skoltoj en ĈSR. ni atentigas, ke inter la hungaraj skoltoj estas granda movado por lerni esperanton. Multaj jam nun lernas, por povi interkompreniĝi kun siaj eksterlandaj gastoj okaze de la Mondendaro (ĵamboreo), kiu okazos en Hungario 1933. Ĉu inter niaj legantoj estas iu, kiu volus preni sur sin la organizadon de esperanto-propagando inter la ĉsl. skoltoj? Li skribu al ĈAE.

Senpage esperanto-prospektojn pri Budapeŝt vi ricevas de Fremdultrafika Oficejo, Budapest IV., Deák F. u. 2.

Ilustritan gvidlibron de Montecatini, la fama banloko itala vi ricevos perante per esp. poŝtkarto al Regie Terme, Montecatini (Italio).

Radio — Wien parolas esperante pri Aŭstrio (S-ro Smital) ĉiun ĵaŭdon je la 16.45 horo.

ESPERANTO PERMESITA POR MALLONGONDA RADIO.

La ĉeĥoslovaka ministerio por poŝtoj kaj telegrafoj informis s-ron Otto Ginz, en Praha, Nacian Sekretarion de la Internacia Radio-Servo, ke ĝi permesas uzadon de esperanto por la amatoraj radiosendoj. Jen laŭvorta traduko de la dekreto:

Ministerio de poŝtoj kaj telegrafoj

Nro 66.850—XI—31.

Praha, la 26. an de oktobro 1931.

Laŭ koncesiaj kondiĉoj submetataj ĉe ni al la sendantaj radioamatoroj oni povas efektiviĝi la radio-amatorajn sendojn sole en lingvo klara kaj oni rajtas uzi la interkonsentitajn signojn internacie enkondukitajn inter la radioamatoroj.

Nenio do malhelpas, ke la ĉeĥoslovakaj sendantaj radioamatoroj uzu dum sia sendado ankaŭ esperanton, kiun oni devas konsideri lingvo klara.

Por la ministro:
subskr. Dr. Burda.

La ĝisnuna stato estis, ke esperantaj sendoj estis en iuj landoj tolerataj. Ĉeĥoslovakio donas nun klaran permeson por nia lingvo.

En la grava laborkampo de amatora radio estis farita grava paŝo antaŭen. Per interveno ĉe siaj registaroj ĉiulandaj samideanoj daŭrigu tiun venkan marŝon. O. G.

Zamenhof

ORIGINALA VERKARO

605 stran skv. váz. místo 120 Kč
jen 85 Kč vyplaceně.

Dr. Edm. Privat:

HISTORIO DE LA LINGVO
ESPERANTO

II. část, 1900—1927
199 stran., v plátně vázaná
Kč 48.— vyplaceně.

V kursech, které chystáte, použivejte... Svým známým k domácímu učení doporučujte....

UČEBNÍCI A CVIČEBNÍCI
MEZINÁRODNÍHO JAZYKA

ESPERANTO

OD PROF. DRA ANT. ŠILHY

96 stran. — Cena Kč 10.60 s portem
Při odběru aspoň 5 výtisků sleva

Vydalo La Progreso, Praha VII.

RESPONDOJ.

Propaganda semajno. La idealo certe estas, ke la propaganda semajno okazu en la tuta respubliko *s a m t e m p e*. Sed, kompreneble, se pro gravaj kaŭzoj lokaj pli konvenas al vi alia semajno, ne hezitu kaj uzu ĝin. Ĉar la ĉefa afero tamen estas: propagandi.

Malriĉa klubo. „Nia klubo estas malriĉa, ni estas sole 10 personoj, ni absolute ne povas porti la kostojn de grandioza propagando, la preson de propagandiloj, inĵiiloj, varbiloj, afiŝoj. Por varbi individue ni estas tro malmultaj“.

Movadon en multaj lokoj kreis unu homo. Se vi do estas 10 personoj, ne opiniu vin malfortaj. Se ĉiu el vi varbos nur unu homon, via klubo kreskos je 100%. Se vi ne havas monon por prestiĝaj afiŝoj, ne presigu ilin. Disvastigu en via loko propagandilojn *Pojtko*, sur kiuj vi surstampis (stampilo cca 20 Kč) informon pri via kurso. La propagandilojn elpendigu en komercejoj, disvastigu en lernejoj, en oficejoj, ĉie, kie unu flugfolio povas legi pluraj homoj. Unu milo de tiuj *Pojtko* kostas ĉe Asocio 50 Kč. Kial vi do mem verku kaj presigu ilin?

Senpaga kursoj? Ne, tial ni ne rekomendas. Eĉ se vi ricevas ejon senpagan, vi tamen havas elspezojn diversajn. Kaj eĉ se tiujn vi ne havus, kian fidon havos varboj por afero, kiun vi proponas al ili senpage? La plejparto de la kluboj postulas 30 Kč por 3monata kurso, kiu havas 20—25 horojn (60minutajn).

LINGVA FAKO

PŘEKLAD 29. TEXTU.

Překlad 29. textu zaslali: p. Karel Dušátko Sázava, slč. Margit Feldmannová Zlaté Moravce, p. Jaroslav Hladký Karvinná, p. Antonín Kubásek Pízeň, p. Frant. Pytloun Bakov, p. Valentin Rosypal Háj, p. Alois Štěpán Hostivař, Verdsteulino, p. Jan Zdvihal Týnec nad Sázavou, celkem 9 účastníků. — Ze 6 nejlepších překladů vylosovali jsme překlad p. Dušátka Sázava, kterému jsme zaslali knižní odměnu.

Estas memkompreneble, 1) ke rezolucioj de la internaciaj kongresoj ne transformos 2) la mondon. Sed tamen ili iam ekmovas 3) ĝin. La okhora labor(taĝ)o estis komence ankaŭ sole en rezolucioj de internaciaj kongresoj, kaj da tiaj aferoj 5) oni povus citi grandan nombron, nesupozitan 6) nombron. Multon 7) 8), hodiaŭ memkompreneblan 13), iam oni devis enmetadi en deziresprimojn de internaciaj kongresoj. La opinio, esprimata en rezolucio ĵus voĉdonita de iu kongreso, estas hodiaŭ sole opinio — papera esprimo. Sed sole ŝajne. Al tiu papera deklaro alpendiĝas en diversaj anguloj de la mondo pliaj deklaroj, kiuj apogas sin 9) sur ĝi. Kaj same kiel la klasika ĝuto konstante frapante traboras la monton granitan 10), tiel ankaŭ la internacia rezolucio pli aŭ malpli frue, pro konstanta ripetado regule fariĝas realigita postulo. Multo 7) kompreneble malaperas 11), falas. La internaciaj kongresoj ne laboras ekonomie. Sed ni ne opinias, ke pro tio estus eble diri, ke la tuta institucio estas neekonomia. La internacia vivo estas tro juna kaj ĝia tradicio fakte ĉiam ankoraŭ kreiĝas, iam per vojoj nerektaj 12).

Poznámky.

1. Estas memkompreneble, ke la rezolucioj, nebo Memkompreneble la rezolucioj (bez ke).

2. přestavěti: transformi, rekonstrui, alikonstrui, aliformi. V těchto dvou posledních tvarech jest užito slova alia, jakoby bylo složeno z kmene ali— (po vzoru ia, kia, tia, atd). Ačkoliv takový způsob není Zamenhofův, setkáváme se často i u dobrých autorů se slovy aliu (iu alia), alio (io alia), alies (de iu alia) alimaniere (aliamaniere), aliloke (alialoke). Vývoj spěje k přijetí těchto forem.

3. Zde přítomný čas: ekmovas.

4. Origine, en la komenco.

5. nikoli: multe da kvanto tiajn objektojn,

nýbrž: multan kvanton da tiaj objektoj. Nikoli: grandajn kvantojn similajn aferojn, — nýbrž: grandajn kvantojn da similaj aferoj.

6. tuŝiti nebezpečí: antaŭsentí danĝeron; tuŝiti pravdu: scieti la veron; tuŝiti zradu: suspekti perfidajon. Netuŝený = nepředpokládaný = nesupozita.

7. leccos není cokoli. Donu al mi kion ajn por trinki: deĵte mi píti cokoliv. Leccos jsem již pil: diversajn aĵojn mi jam trinkis. Leccos jsem již viděl: diversajn aferojn mi jam vidis, multon mi jam vidis. Kion ajn oni proponis al mi, nenio plaĉis al ŝi: cokoli nám nabízeli, nic se jí nelíbilo.

8. Multon musí být ve 4. pádě. Věta zní: Multon oni devis iam enmetadi... Podobně: La paketon, kiu kuŝas sur la tablo, sendis mia frato. La libron, kiu havas titolon Marta, mi ne legis.

9. Mi apogas min sur la aŭtoritaton de nia prezidanto — odvolávám se k autoritě našeho předsedy. Rilatante al mia lasta letero: odvolávaje se na svůj poslední dopis. Odvolávať se z něčeho k vyšší instanci: apelacii al la pli alta instanco. Viz odvolávku na str. 15.: Vidu revokon al la paĝo. . .

10. Nepoužijete-li citátu o té esperantské klasické kapece z básně Zamenhofovy, jak ji my uvádíme tedy: Kaj same kiel la klasika ĝuto kavigas la rokon per la ripetata falo, ... per sia ofta falado, ... konstante falante.

11. Multo malaperas, (for)falas (forĝesite) Nebo: Multo malaperas, forĝesiĝas. Enfalí = padnouti do něčeho.

12. též: per deturniĝoj.

13. memklaran.

30. TEXT K PŘEKLADU.

Jak pracoval Edison. Přes svůj vysoký věk pracoval Edison ještě v posledních letech až 18 hodin denně. Když šlo o rozřešení nějakého problému, neznal odpočinku. Celý svůj mozek soustředil jen na svůj problém a nepovolil, dokud jej nerozřešil. Mnozí, kdo byli kolem něho, věděli, že žádá od nich často nemožností. Když byl zachvácen horečkou práce nebo horečkou dokonání věci, zapomínal na spánek a jídlo. Pouze jeho žena mohla a dovedla zasáhnout do těchto období vyčerpávající práce.

Přeložte tento text a zašlete nám překlad do 14 dnů po obdržení tohoto čísla. Členové klubů, přeložte si tento text doma a v příští schůzi klubu věnujte půlhodinku k společnému

porovnávání svých překladů a rozhovoru o nich. Výsledek nám zašlete i se všemi názory, které se vyskytnou, tak jak to dělává klub v Hradci Králové.

Něco pro samouky i kursy.

Toto je cvičení k překladu pro samouky a žáky kursů, kteří si chtějí zopakovat pravidla o směrové koncovce *-n* a o koncovce *-us* podmíňovacího způsobu.

Než se dáte do překládání, zopakujte si v učebnici (Šilha, str. 16.): En la koridoro = (kde?) na chodbě; en la koridoron = (kam?) na chodbu. Antaŭ la forno = (kde?) před kamny; antaŭ la fornon = (kam?) před kamna. Kie tie = kde—tam; Kien—tien = kam—tam. Kien vi metis la libron? Sur la tablon! — Kie kuŝas la libro? Sur la tablo! — Kie vi estas? — Kien vi iras? — Ĉu ni iru en la arbaron? Jes, ni iru tien, tie estas agrable.

Zašlete nám, třeba na korespondenčním lístku, překlad dolejšího cvičení *Náš kurs*. A napište upřímně, které jiné věci chcete si s námi zopakovat.

Příště si z dolejšího cvičení uděláme překlad konversace.

Náš kurs se koná ve škole. Chceme-li přijít do naší třídy (učebny), vcházíme velkými dveřmi školy do chodby. Stoupáme po schodech, přicházíme do prvního patra. Tam hned vedle schodů do druhého poschodí je naše třída. V ní může sedět i sedmdesát osob, počítáme-li pět osob na každou ze čtrnácti lavic. Dokládáme svoje sešity na lavici. Učitel (vedoucí kursu) opravuje úlohy, které jsme doma psali, a zkouší žáky (členy kursu).

Mohl by také říci některému z nás: Pojdte sem na podium a pište na tabuli, co budu diktovat. Co by učinili ten žák nebo žačka? Vyšel by z lavice a šel by před lavice, na podium. Učitel by diktoval a žák by psal. Jestliže se dobře učil, napíše vše dobře. Když skončil, vrátí se do své lavice.

Slovník obchodně-technický, účetní a daňový. Sešit čís. 13—15-IV. obsahuje: Jízdenka — Jízdenky autobusové — Jízdné — Jízdní řády — Jižní plodiny a jižní ovoce — Jméno — Jmění (v zemědělském podniku — v průmyslovém podniku — soukromé v bilanci podniku) — Jugoslavie — Juta — Juxta — Kakao — Kalendáře — Kalkulační bilanční teorie — Kalkulace (souvislost s bilanci — průmyslové — v zemědělství — zboží — živnostenská) — Kámen — Kamenina — Kamenický průmysl. Expedují Tiskové podniky Ú. S. Č. P., Praha I. Masarykovo nábřeží 4. Cena sešitu Kč 19.50.

Knihy za snížené ceny!

Použijte příležitosti

a doplňte si svoji knihovnu!

Pamatujte na Den knihy a na Vánoce!

Beletrie:

Forge J.: Abismoj, 150 str. broš. m. 24.— 14.—
váz. m. 36.— 22.—

Forge J.: Saltego trans jarmilojn,
192 stran, váz. m. 40.— 22.—

Luyken H. A.: Stranga heredajo,
320 stran broš. m. 44.— 24.—
váz. m. 56.— 32.—

Luyken H. A.: Pro Iŝtar. Romano
el antikva Babela historio. 304
stran váz. m. 56.— 32.—

Raimund F.: La Malŝparulo. 97 str.
brož. m. 16.— 8.—

Wagnalls M.: Palaco de Danĝero.
Rakonto pri Madame la Pompa-
dour, 206 str. skvostně váz. m. 48.— 32.—

Internacia Mondliteraturo:

Každý svazek 64—84 str. v karton.
obálce, 15×19 cm m. 13.— 6.50.—

Dvojitý svazek m. 20.— 13.—

Všech 20 sv. vázaných vždy po pěti
(1—5, 6—10 atd.) m. 48.— 32.—

sv. 1. Goethe: Hermano kaj Do-
ro:eo. m. 13.— 6.50

2. Niemojewski: Legendoj. m. 13.— 6.50

3. Turĝenev: Elektitaj noveloj m. 13.— 6.50

4. Raabe: La nigra galeo. m. 13.— 6.50

5. Hildebrand: El la „Camera
Obscura“ m. 13.— 6.50

6. Irving: El la skizlibro. m. 13.— 6.50

7. Chamisso: La mirinda histo-
rio de Petro Schlemihl m. 13.— 6.50

8. Stamtov: Nuntempaj rakon-
toj m. 13.— 6.50

9. Salom Alehem, Perc: He-
breaj rakontoj m. 13.— 6.50

10. Puŝkin: Tri noveloj. m. 13.— 6.50

11/12. Ariŝima: Deklaracio (ja-
pana romano) m. 20.— 13.—

13. Poe: Ses noveloj. m. 13.— 6.50

14. Balzac: La firmao de la kato
kiu pilkludas. m. 13.— 6.50

15. Doroŝevič: Orientaj fabeloj m. 13.— 6.50

16. Sienkiewicz: Noveloj. m. 13.— 6.50

17. Strindberg: Insulo de felí-
culoj. m. 13.— 6.50

18. Bertrana Prudenci: Barbaraj
prozajoj. m. 13.— 6.50

19. Ŝimunovič: Ano de l'ring-
ludo. m. 13.— 6.50

20. Eekhoud: Servokapablo! m. 13.— 6.50

21. Sadoveanu: Nobela peko. m. 13.— 6.50

Aŭstralio lando kaj popolo. 96 str.,
31 ill., 1 mapa, skv. váz. m. 52.— 34.—

La Vendreda Klubo, 11 artikoloj
red. dr. Dietterle, 115 str. m. 20.— 12.—

Snížené ceny platí jen krátký čas.

Opatřte si knihy ku Dni knihy a na Vánoce!

Ke všem cenám 10% na poštovní výlohy.

Jen za hotové, nikoli na úvěr.

Zašlete-li příslušný obnos (plus 10% pošt. výl.)

blankosloženkou na účet La Progreso a čís.

34.271, dostanete knihy během 8 dnů.

Novinová sazba povolena Ředitelstvem pošt a telegrafů v Praze čís. 238.888/VI-23.

Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HROMADA. - Presis JAN MINAŘ NYMBURK.